

Amerika Esperantisto



JANUARY, 1917

AMERIKA ESPERANTISTO

Official Organ

of

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the
International Auxiliary Language, Esperanto

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Wednesday evenings.. Address H. S. Lane, Sec'y, 1323 Oxford St.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Sec. & Treas., 436 15th St.

BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 8 P. M. R. Goodland, Sec.

BUTTE, MONT.

Argentarka Esp. Rondo, kunvenas vendrede, 8.00 P. M. C. L. Williams, Sek., 311 E. Mercury St.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park Fr. Kovarik, 2502 S. Kedzie Ave., Sek.
La Esp. Oficejo, 1669 Blue Island ave.
Fino R. Votlučka, 1539 W. Jackson Blv. Sek.
Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

CINCINNATI, OHIO.

Cincinnati Esperanto Soc., 629 Vine Street.
E. H. Becker, Sec., 511 Sycamore St.

DELPHOS, OHIO.

Delphos Esperanto Klubo, Carnegie Library; Meets every Tuesday, 7.30 P. M., A. J. Laudick, Secy.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3913 Sackett Ave.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody, daily 7 A. M.-9 P. M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8-10 P. M.

La Pola Esp. Unuiĝo, ĉiusemajne, Magnus Butzel Library, Harper & E. Grand Blvd.
La Septentrio, Tues., 8.00 P. M., 578 Alexandre ave., W.

HOUSTON, TEXAS.

Houston Esperanto Rondo, ĉiun mardon, 8.00 P. M., ĉe Y. M. C. A. S-ro A. F. Sundermeyer, Sek.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists, S-ino B. H. Kerner, Sek. 632 Summit ave., 2nd Mondays, 8 P. M.

NEW YORK, N. Y.

Greater New York Esperanto Society.
C. C. Coigne, Sec'y, 243 Bedford Pk. Blvd. Tel. Fordham 2749.

NEW YORK (Manhattan) N. Y.

The New York Group, Wash. Irving H. S. Jos. Silbernig, Sec., 235 E. 18th St.

NEW YORK (Manhattan) N. Y.

Germana Esperanto-Societo, 1966 Broadway, Rm. 27...Open every Wed. for information 7-8 P. M.; Meetings and classes, 8-9.30 P. M.

PHILADELPHIA, PA.

Phila Esp. Soc., J. F. Knowlan, Sec., 45 No. 13th St. Meets 4th Fri., Windsor Cafe, 1217 Filbert St.

PHILADELPHIA, PA.

Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art Wm. Smith, Sec., 7315 Greenwood St. Fridays, 8 P. M., Teachers' Rm., Carnegie Inst.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg., Mrs. Wm. C. Tapley, Sec'y, 13 East Promenade.

ROCKFORD, ILLS.

Skandinava Esperanto-Instituto, 417 7th St. Joseph Johnson, Sec'y, 2315 Parmele St.

SALT LAKE CITY, UTAH.

Salt Lake Esperanto Club, Mrs. F. M. McHugh, Sec., 4002 So. State St.

SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Rondo, meets Friday eve., Rm. 127, Lick Bldg., 35 Montgomery St., F-ino M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Ave.

TILDEN, NEBR.

Esperanto-Fako de la Nebraska ŝtata Kristana Celada Unuiĝo, Estro, Pastro Chas. P. Lang, Tilden, Nebr.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society Business Institute, every Friday, 8.00 P. M.

Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at
West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)

WEST NEWTON, MASS.

ONE DOLLAR A YEAR Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50) SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukajoj kaj novaĵoj ĉiam prefere akceptitaj. Oni ne resendas neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone.

Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaŝine.

VOL. 19

JANUARY, 1917

NO. 6

Owing to the pressure of his professional duties Dr. Fessenden has been obliged, to the great regret of all, to resign his office as Secretary-Treasurer of the Esperanto Association of North America. Mr. Ernest F. Dow has been elected by the Councilors to fill out the unexpired term, until the next Congress. Please address all official mail for the Association in future to Ernest F. Dow, Secretary, West Newton, Mass. With the Guarantee Fund now in a condition where we feel that we can depend upon some help from that source, we have engaged clerical help so that the work of the office will soon be caught up and, we hope, matters will go on more smoothly.

We have had during the past few weeks, many requests for a catalog of the books we handle. Owing to the serious difficulties in the way of importing European books, we have not thought it wise to issue a regular catalog, as many of the books listed would be out of stock and unobtainable within a few weeks after its appearance. We shall, however, beginning with the next number, issue each month as a part of the maga-

zine, an abridged list of books, adding thereto as new ones are received, and deleting those which are out of stock with no immediate prospect of obtaining more. Thus our customers can order at any time from the latest number of the magazine with a reasonable prospect of receiving the books ordered. This will save both our customers and ourselves much correspondence and annoyance.

Just as we are ready to give up the ghost and wondering where the next month's rent is coming from, always comes along a letter like the following, which puts new heart into us, makes us roll up our sleeves, and go at our duties with fresh determination to keep Esperantujo on the map in spite of all the wars and rumors of wars, the H. C. of L., the machinations of the paper trust, the scarcity of help and everything else. Who is the next one?

Dr. C. H. Fessenden:

Dear Friend:—With this I enclose two dollars, as I did two years ago, to help the Esperanto cause along. You may think the amount small, but it is truly all I can do. Sometime in October I sent my yearly dues to you,

—which I hoped you received—and I buy Esperanto books whenever possible. Last week I renewed my subscription to "Amerika Esperantisto," and would be glad to do more if possible. Esperanto is worth all we can do for it.

ESPERANTO

The Auxiliary Universal Language.

The board of directors of the Central District (Illinois, Wisconsin and Michigan) wish to become acquainted with all the Esperantists within its district and invite correspondence. Address, ESPERANTO office of Detroit, 607 Brietmeyer Building, Detroit, Mich.

At the cost of more than \$20, the above announcement was published in Milwaukee, Chicago and Detroit papers, by the Detroit Esperanto Office.

IN THE PRESS

The "Rockville (Conn.) Leader," daily, informs us of the lecture on Esperanto delivered by Mr. Hans B. Julow before the Men's Union of the Union Church. The newspaper publishes the photograph of Mr. Julow, who is well known to the Central Office for his inspiring loyalty to the cause, and mentions the masterly manner in which he handled the address. Mr. Julow began by giving the Lord's Prayer in Esperanto, and then continued with a full account of the history of Esperanto, its early struggles, present status, grammatical construction, etc. The "Leader" reprints the entire address, so that much additional publicity is obtained. Four full columns in the newspaper are devoted to it. We congratulate Mr. Julow on the success of this first Esperanto speech, and feel that a firm foothold has been gained in this vicinity.

The "Brooklyn Eagle" of Jan. 7 contains a request for information about Esperanto, which was answered by the newspaper most accurately and completely. The address of the Central Office, and that of the former New York Secretary were both mentioned.

The "New Yorker Herald" (German), for Jan. 17, contains an ac-

count of the anniversary festivities of the German Esperanto Club, a report of which is found under "Kroniko Nordamerika."

The Polish daily of Detroit (Jan. 20) contains a 2-column article on Esperanto and the work of the Polish Esperanto Society in that city. Under the patronage of Dr. Tobias Sigel, and with such able leaders as Messrs. Alex Schwarzenzer, B. Lendo and others, this society is becoming a powerful factor in the work of the Central Division. The newspaper publicity is a sign of its growing success.

The Detroit Free Press (Jan. 31) contains the report of an interview with Mr. Henry Ford, the well-known manufacturer, in which Mr. Ford states that he "believes lasting peace will come only when there is a universal language." In the same article, Dr. Tobias Sigel, agreeing with Mr. Ford says: "I believe Mr. Ford is absolutely right. If we are to have a lasting peace, it must be because all peoples can cry to others, 'Hail, fellow, well met!'"

KRONIKO NORDAMERIKA

New York.—La 1a Fondigo-Festo de la Germana Esperanto-Asocio, Nov-Jorko, estis sukcesplene festita en la "Elizabeth Tea Rooms," la 13an de Januaro, 1917.

S-ro Emilo Jordan malfermis la kunvenon per parolado, dirante ke la Esperantistoj komencas labori kun la plej edukitaj klasoj de la tuta mondo.

S-ro von Bergen, meminstruita ano de la G. E. S., bele kantis je la melodio, "Gaudeamus igitur."

F-ino Stoeppler, per parolado, donacis silkan "verda stelo" standardon en la nomo de kelkaj membroj.

S-ro E. Ehnis, la laborema prezidanto de la G. E. S., kiu ne povis ĉeesti pro malsaneco, ricevis esprimon de la ĉeestantaro.

La plej interesa parto de la kunveno estis la parolado de S-ro Emanuel Reicher, la fama aktoro de la Berlina Lessing teatro, unu el la plej rimarkindaj eminentuloj de nia afero.

Profesoro Christen kaj S-ro Simons, ĉeestis kaj alparoladis la kunvenantojn.

S-ro Simons komparis la kontraŭ-

ulojn kun tiuj urbetanoj kiuj ne volis la elektraĵn veturilojn, ĉar la ĉevalveturiloj estus tiam senutilaj.

S-ro Lutz kaj S-ino Smith zorgis pri la muzika parto de la programo. Se Germanoj estas gajaj, ili havas malferman koron—kolekto por la "Red Cross" de \$32 pruvas tion.

Kanto kaj danco ĝis la dua matene fermigis la sukcesplenan aferon.

Emil Jordan (N. Y.).

La naskiĝtagon de la Majstro oni festis tie ĉi je la "Brooklyn Central Y. M. C. A." Post la barĉo, S-ro H. W. Fisher priparolis la vivon de D-ro Zamenhof; S-ro Silbernik rakontis pri la U. E. A.; F-ino L. F. Stoeppler pri la Nov-Jorka Societo kaj S-ro Ehnis pri la Germana Grupo. Oni ĝuis laŭdindan muzikan programon de kelkaj anoj de la "Port Richmond Mandolin Club."

F-ino Cora Butler anoncis ke gratulada depeŝo estas sendita al la Majstro per la senfadena telegrafo,—depeŝo de du vortoj: "Korajn bondezirojn."

Detroit, Mich.—La Polaj Esperantistoj de la urbo kondukis grandan publikan kunvenon, kun multaj paroladoj, ktp. La Pola tagjurnalo enhavis bonan raporton pri la afero.

Denver, Colo.—Esperantaj kursoj nun estas kondukataj en la altlernejoj tie ĉi. La Estro de Lernejoj, S-ro Cole permesis ke la Denver Esperanta Societo gvidu kurson du vesperojn ĉiusemajne. S-ro Alfred Doerner, laŭ intervjuo en loka tagjurnalo, diras ke Denver komercistoj multe interesiĝis pri la studado. La kursoj enhavas ĉefe profesiajn kaj komercajn virojn, kun iliaj edzinoj, kaj estas gviditaj laŭ la aliaj studoj en la nokta altlernejo.

Washington, D. C.—Jan. 21an, kvar Esperantistoj el Nov-Jorko vojaĝis ekskurse al Washington, D. C., por interfratiĝi kun la lokaj samideanoj tie ĉi. Spite de la malbonega vetero, S-roj Creston C. Coigne, Armand B. Coigne, Alex. Mendelson kaj Richard Carter alvenis en la stacidomo, antaŭ la sunleviĝo, kie S-ro H. A. Babcock renkontis ilin. Post vizito al bonekonata "Arlington Cemetery," revenante en la tramo, oni rimarkis sinjoron kiu portas U. E. A. stelon en sia butontruo. S-ro Coigne parolis al li, kaj ĉiuj ĝojigis renkontante S-ron

B. Pickman Mann, fervora Washingtona Esperantisto. Oni ankaŭ renkontis S-ron John A. Shiel, la U.E.A. delegito, kiu kondukis la kvaron al la "Brookland Monaĥejo," kaj poste al aliaj interesaj lokoj tiel famaj en la Nacia Kapitalurbo. La kvar vizitantoj raportas ke ĉiu tute ĝuis la "Esperantistan Dimanĉon."

ORGANIZED PROPAGANDA COMMITTEE State Consuls

Isabelle M. Horn, Chairman
G. W. Lee
C. H. Kavanaugh
Kenneth C. Kerr
Dr. F. G. Cottrell
W. G. Stone, Maine
C. C. Coigne, New York
A. S. Vincent, California
W. W. Pannell, Oklahoma
J. Homer Clark, Oregon
A. F. Sundermeyer, Texas

The following article, by Mr. K. C. Kerr, member of the Propaganda Committee, is published for the benefit of Committee members and consuls who have not yet received a copy of same. You are urged to use this, either wholly, or extracts therefrom, and secure publication in daily or weekly newspapers in your vicinity. It may be incorporated in a letter to the editor, in the "People's Forum," or in whatever way may be customary in your vicinity. The one idea is to get the facts in print,—the method is left to your discretion.

The number of people who have "never heard of Esperanto" is quickly diminishing, and this has been accomplished by advertising,—by publicity.

We cannot force anyone to learn Esperanto,—we do not want to; but we can keep before the reading public the fact that the International Language is a **live** tongue, because its advocates are **alive**.

—o—

Active preparations are now being made by the commercial and manufacturing interests of this country to take advantage of the unique opportunity the close of the great war must offer for the extension of our foreign trade. These preparations include investigations into the needs of other

countries, their banking and trade laws, the duties on exports and imports, the varying trade customs of each country and the thousand and one other details that will need to be thoroughly understood before we can hope to successfully compete for their business.

At the same time the facilities of this country are being mobilized to the end that all the interests concerned may combine to undertake operations under the best possible circumstances for the greatest benefit to this country. In this department of the preparations Congress has been invited by President Wilson to take part, by enacting laws which will enable merchants and manufacturers to form combinations such as are impossible under our present laws. It is recognized that while combinations are not of the best advantage, so far as our domestic business is concerned, it is very much the other way when they are formed to meet the exigencies of trade with foreign lands. All other countries which have developed large foreign trade have done so largely with the help of such combinations, and we must follow their example if we would profit by our efforts.

In Pittsburgh, in January, 1917, occurs a meeting of the Foreign Trades Council for the purpose of communicating to merchant and manufacturing interests of the country the results of investigations which have been carried on during the past year, and this meeting may really be considered as the completion of the first step in the program of preparation. The U. S. Department of Commerce and Labor has a bureau devoted entirely to such work as the Foreign Trade Council has independently undertaken, and in pursuance of its purpose to send a number of competent men to the various countries with which we hope to trade, recently advertised for about a dozen men who should undergo an examination as to their ability to conduct a series of investigations. As it is necessary, in order to secure one of these positions (which will pay about \$5,000 a year), that a man should know very thoroughly the commercial laws of this country, together with special knowl-

edge of many manufactures and their trade characteristics, as well as being well grounded in trade information regarding the countries in which they are expected to operate, it can well be understood that there were not many applications to spare.

In many other directions of a private character these investigations are being carried on, and altogether the campaign of preparedness is being prosecuted with energy and dispatch, and it is estimated that by the time peace has been declared this country will be quite ready to do its part.

Foreign trade having hitherto been comparatively negligible in quantity and scope (and where it existed was mostly conducted through agencies established in the respective countries), the question of the use of foreign languages has not played the part it might in our system of education. Of course French and German have been taught for many years in our public schools and colleges, but more for cultural than commercial purposes. Spanish as a commercial language has become very popular, and it will be very useful in the development of our Central and South American trades, into which we are entering more energetically than ever before.

One feature of our commercial preparedness, then, will be destined to play a most important role in the realization of our dreams of commercial expansion,—that of languages. In Europe its importance has long been appreciated, and naturally so; because, if a business was to expand at all, it must of necessity do so in foreign lands. In almost every land, therefore, the system of education has made compulsory the acquisition of one or more foreign languages. It is rightly regarded as of the utmost importance that one should know the language of the foreigner with whom one trades. If you are to succeed you must know more than the bare commercial needs of your prospective customer,—you must establish a certain rapport with him. How can this be accomplished if you cannot speak his or he your language?

In acquiring the natural languages there is involved a long and severe period of study and practice and, when it comes to meeting the foreigner on

his own soil and talking to him, difficulties undreamed of constantly confront you, as, for example, the idioms of his daily speech. To overcome this and other difficulties it takes another period of practice during which you are obliged to live among the people whose language you desire to master. For many who would make most excellent salesmen if sent abroad the question of language forms a most serious stumbling block. Is there a way of surmounting that obstacle without the years of effort which one must expend in acquiring one or more of the natural languages—say by means of a neutral language ideal for such interchanges, simple in its construction and correspondingly easy of acquirement, comprehensive and of exact definitions, avoiding doubtful idiomatic expression?

The purpose of this article is to show that there is such an ideal language. It is Esperanto, which has been almost thirty years in existence and is used commercially, socially and in connection with various fields of science very generally in Europe.

This language is the first of an artificial character to successfully solve the problem of an auxiliary medium for use between peoples of different tongues and races. In the last three centuries several hundred attempts have been made, but Esperanto is the only one of them which may be acquired easier than any of the natural languages are. The others offered more, instead of less, complications than the natural tongues, and accordingly, outside of certain narrow circles, never gained any popularity and seldom if ever outlived their authors.

Esperanto, on the other hand, has several features which render it peculiarly attractive, not alone to the scholar accustomed to study, but to the man of business who has little time and comparatively little experience as a student. In the first place, its roots are formed directly from those words most common to the European languages. As English, for example, is derived from several other languages, the basis of most of which is Latin, it is possible for an English-speaking person with an ordinary public school education to recognize

about seventy per cent of the roots of Esperanto.

Another feature is the grammar, which has just sixteen endings, including the whole of the verb, and contains no irregularities or exceptions. The accent is always on the penultimate and the sounds of the twenty-eight letters of the alphabet never change, no matter what the position they may occupy in a word. In studying the language one learns the root of a word and, by adding the grammatical ending, makes the root a noun, adjective, verb or other part of speech. By means of a series of prefixes and suffixes, of which there are in all about forty in the language, it is possible to modify the idea contained in the root to a wonderful extent. There is also a series of correlative words numbering forty-five, which one must learn, besides thirty or forty adverbs of fixed forms and a few pronoun forms, numerals, etc. When these are acquired one is equipped, and all that is needed to make one able to read, write and speak Esperanto is a few months practice. Like everything else, however, that is worth while, there is considerable work to be done before one can be called an Esperantist. One must practice every day, if even a very little at a time for about six months before reaching that point. Some have been able to master the language, however, in less than four months.

The system is thus seen to be one of wordbuilding and it is possible from one root by means of the affixes and grammatical endings to form in many cases as many as fifty words of distinct though related meanings. At first sight it seems difficult but after a few days trial one finds it fascinatingly easy. Esperanto is no plaything for the dilettante, but has a most serious mission. The best proof of this lies in the fact that busy men and women in many lines of endeavor have been using the language in their everyday business for years. The great governments of the world have been carefully observing the progress of Esperanto from year to year, being represented at the annual congresses held in various parts of the world since 1905. Since the beginning of the present war Germany for herself

and allies and France similarly for herself and allies, have periodically issued bulletins in Esperanto, for distribution among neutrals, principally. The International Red Cross Society also uses Esperanto officially.

But particularly for the purposes of this article are we interested in the fact that the language at the outbreak of hostilities was in daily use in thousands of business houses in Europe and elsewhere in the world. For foreign correspondence it is ideal, as one Esperantist in an office can attend to all the correspondence of his firm with customers and agents in other countries, thus cutting down what was at one time a very heavy item of expense. So generally is Esperanto known in Europe that even if a firm written to does not employ an Esperantist, one can very readily be found.

Business men who are contemplating entering into foreign trade will find it of advantage to seriously study this matter of an auxiliary language for their foreign correspondence and especially with Russia, where Esperanto was invented and first taught. The government there was for many years opposed to the language, but within the past six or seven years has even allowed it a place in the commercial bureau of one of its departments. The Russian language is a most difficult one to acquire and while an American house might find native Russians to conduct its correspondence there would not fail to be a most decided disadvantage in the heads of the house being unable to read, speak or write that language. By adopting Esperanto the heads as well as the clerks could make themselves efficient Esperantists with but a few months steady application to the study of this most interesting, marvelous language.

The propaganda of Esperanto is conducted by the Esperanto Association of North America having headquarters in West Newton, Mass., Mr. Ernest F. Dow, Secretary, while there are many local societies scattered throughout the country.

K. C. Kerr,
Member, National Propaganda Committee.

The Propaganda Consul for New York, Mr. Creston C. Coigne, reports the following:

Dr. Arthur E. Warren, of Buffalo, has accepted the office of representative for Buffalo on the Propaganda Committee, and suggests that we may see something doing in the not distant future. Have heard from other Esperantists in B. and things look favorable for a society not far from now.

GUARANTEE FUND

Additional Subscribers

C. H. Crossman, Canada.
Hans B. Julow, Conn.
Arthur E. Warren, N. Y.
Frank P. Zent, Wash.
Rudolph Timmler, Nebr.
Paul M. Schuyler, Mich.
W. H. Chase, Calif.

SPECIAL MEMBERS

The following are added to our list of Special Members for 1916-1917:

Lee A. Miller, Md.
C. H. Crossman, Canada.
H. B. Frost, Calif.

—o—

SUSTAINING MEMBERS

Mr. Herbert Harris and Dr. J. W. Snider have renewed their support of the Central Office for the current year.

To all the above, the Association expresses its cordial thanks.

—o—

La gejunuloj ĵus fianĉiĝis.

Si—Kia ĝojo nun estos al mi, kiam mi povos partopreni en ĉiuj viaj ĉagrenoj kaj malĝojoj!

Li—Sed mi ne havas tiajn, karulino.

Si—Eble vi nun ne havas; sed, kiam ni edziĝos, vi ja havos.

Ho Ho trad.

—
"Doktoro, via ekzamenado de miaj okuloj estas tro longa," diris la belega junulino. "Ĉu vi suspektas ion seriozan?"

"Ne, mia kara junulino, sed estas tia plezuro rigardi en tiajn belegajn okulojn, kaj ankaŭ ricevi du dolarojn pro la vizito."

Trad. W. H. H.

FOR THE BEGINNER

Edited by Herbert M. Scott

Our readers are invited to send us any difficulties encountered in their study of the international language, inquiries being answered promptly and completely in this department of the magazine.

Ĉ has the sound of ch in "church." Ĥ, the only Esperanto letter with a sound foreign to English, is produced, if the allusion may be pardoned, by

an effort of the throat identical with that in "hawking" or clearing the throat. It is the guttural sound as in the German ach! or the Scotch loch.

La aminda juna reĝido **direktis** sur ŝin siajn okulojn nigrajn kiel karbo. F. K. 52.

The charming young prince turned upon her his coal black eyes.

To express direction we add to the word the ending **n**.

Por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la finon "n" Ekz. 28.

(In Kabe's Vortaro, p. 65, we find "**direktaj** kaj ne **direktaj** impostoj." This is the only instance in a good writer we have found of an adjectival use of the root **direkt'**, the English adjective "direct" being usually rendered by **rekta**, the more logical root for this sense.)

La kuracisto diras, ke mi bezonas min **distri**. F. K. 81.

The doctor says I need diversion.

De la lanterno estis distrata antaŭen elektra **lumo**. F. K. 140.

From the (head)light electric radiance was diffused ahead.

Ĉirkaŭe en la ĉambro estis distrita ankoraŭ multe da sendefinaj pufseĝoj. F. K. 154.

Around the room, in addition, were scattered quite a number of indescribable upholstered chairs.

La militestro jetis sur lin distritan kaj malgajan rigardon. V. P. 54.

The general cast upon him a sad and absent look.

Ĉu vi memoras ankoraŭ, kiel la sinjoroj de la kolegio forpafis piedon al via **dogo**? Rab. 18.

Do you remember yet how the college authorities shot a leg off your hound?

Mi makleras speciale pri la **drapoj** kaj teksaĵoj ĉiuspecaj. F. K. 228.

I make a specialty of handling woolen goods and cloth of all kinds.

Dresi hundon por la ĉaso; dresi ĉevalon por la cirko. Vort. 34. See F. K. 91:30.

To train a dog for hunting; to break in a horse for the ring.

Mi scias.....kiuj oficiroj **drinkas**. Far. I. 171.

I know which officers tipple.

Tion ĉi....mi komunikas al vi, por turni vian atenton sur viajn **efektivajn**, verajn amikojn. F. K. 28.

I tell you these things to call your attention to your real, true friends.

Por ĉiu **eventualo**, mi kunvokos la kunvenon de Egiptanoj. Far. III 90.

At all events I shall call the meeting of Egyptians.

La laboristoj en fabrikoj....sufegas tre ofte je kronika konjunktivito. F. K. 232.

Iu disvastigas famon. Far. II.37.

Vi metus sur vin veston de eleganta fasono. Marta IV.55.

Ni farigos al ni konsciencan laŭ la plej nova fasono. Rab. 14.

Vi ordonis faston en la tuta urbo. Rab. 18.

(Daŭrigota)

New abbreviation: Vort = Vortaro de Esperanto, by Kabe.

Workers in factories are very often sufferers from chronic conjunctivitis.

Someone is spreading a rumor.

You would put on a dress of elegant style.

We will have us made a conscience after the latest cut.

You ordered a fast in the whole city.

LA LEGENDO DE DORMA KAVO

De Washington Irving

Tradukita de Herbert M. Scott

(Daŭrigo)

Militiri malkaŝe kontraŭ sia rivalo, estus estinta frenezajo; ĉar tiu ĉi, simile al sia prototipo Ahilo, estis viro ne malhelpebla ĉe siaj amajoj. Ihabod do alpaŝis al la celo en kvietaj, serpenteta maniero. Sub preteksto de sia rolo de kantistruisto, li faris oftajn vizitojn al la farmdomo. Li ja havis nenion por timi de enmiksiĝo de gepatroj—ordinara falilo en la vojo de amantoj. Balt Van Tassel estis trankvila, indulgema animo; li amis sian filinon eĉ pli bone, ol sian pipon, kaj kiel prudenta kaj bonega patro, li lasis, ke ŝi agu en ĉio laŭ sia bontrovo. Lia rimarkinda edzineto, ankaŭ, havis sufiĉon por fari, zorgante pri la mastrumado kaj la birdokorto; ĉar, kiel ŝi saĝule atentigis, la anasoj kaj anseroj estas stultaj aĵoj kaj oni devas okupi sin pri ili, sed la knabinoj povas gardi sin mem. Tiel, dum la diligenta sinjorino viglis tra la domo, aŭ funkciigis ŝpinilon ĉe unu fino de la verando, la honesta Balt sidadis, fumante vesperan pipon ĉe la dua, observante la glorfarojn de eta ligna militisto, kiu, armita per glavo en ĉiu mano, kontraŭbatalis plej brave la venton sur la pinto de la grenejo. Samtempe Ihabod amindumadis la filinon apud la fonto sub la granda ulmo, aŭ promenante en la krepusko,

tiu horo tiel favora por la amelokventeco.

Mi konfesas ne scii, kiamaniere la virina koro lasas sin al militi. Por mi la virinoj estadis ĉiam afero enigma kaj admirinda. Unuj el ili ŝajnas havi nur unu vundeblan punkton aŭ enirpordon; dum aliaj havas mil pordojn kaj estas kapteblaj laŭ mil diversaj vojoj. Estas granda triumfo de la lerteco, akiri tiujn unuajn, sed ankoraŭ pli granda atesto pri generalarto, posedadi ĉi tiujn lastajn, ĉar oni devas batali pro sia fortikajo ĉe ĉiu pordo kaj fenestro. Kiu do gajnas mil ordinarajn korojn, tiu meritas iom da renomo; sed kiu regadas senkontraŭstare la koron de koketulinio, tiu ja estas heroo. Certe estas, ke tiel ne prosperis al la timinda Brom Bones; kaj de la momento kiam Ihabod Gruo antaŭvenis, la intereso de la unua eksuferis; lian ĉevalon oni plu ne vidis ligitan al la barilo en dimanĉaj vesperoj, kaj iom post iom malpaco disvolviĝis inter li kaj la profesoro de Dorma Kavo.

Brom, kiu havis en sia naturo kelkan dozon da kruda kavalireco, estus volonte pelinta la aferon ĝis rekta milito, decidigante en iliaj pretendoj sur la fraŭlinon laŭ la metodo de tiuj plej koncizaj kaj simplaj rezonintoj, la migrantaj kavaliroj de la praepoko—nome per fizika batalo; sed Ihabod

tro konsciis la superforton de l' malamiko, por eniri la arenon kontraŭ lin; li subaŭdis fanfaronon de Bones, ke li "frakasos la lernejestron kaj disĵetos la pecojn en ĉiun angulon de la lernejo"; kaj li estis tro singardema, por doni al li la okazon.

Tiumaniere la aferoj iris dum sufiĉa tempo, sen grava ŝanĝiĝo en la relativaj cirkonstancoj de la konkurantaj potencoj. En bela aŭtuna posttagmezo, Ihabod, en pensa humoro, tronis sur alta tabureto, de kie li kutime observis la tutan aron de sia literatura regneto. En mano li svingis liniilon—sceptro de despota forto; la vergo de la justeco ripozis sur tri najloj post la trono—konstanta teruro por la malbonaguloj; dum sur la pupitro antaŭ li estis videblaj diversaj kontrabandaj objektoj kaj malpermesitaj bataliloj, trovitaj ĉe maldiligentaj buboj; ekzemple duon-mangitaj pomoj, blovpafiloj, turboj, muŝkaptiloj kaj tutaj legioj da batalpretaj vetketoj el papero. Ŝajne ia infera bato de la justeco ĵus falis, ĉar liaj lernantoj ĉiuj atentis zorge siajn librojn, aŭ kaŝe flustris malantaŭ ili, strabrigardante la estron; kaj io kvazaŭ zuma silento plenigis la tutan ĉambron. Ĝi estis subite rompata per apero de negro en stupĉofaj jako kaj pantalone, rondverta fragmento de ĉapelo, simila al la ĉapo de Merkuro, kaj sidanta sur dorso de vila, kruda, duondresita ĉevalo, kiun li kondukis per ŝnurego anstataŭ per brido. Li alvenis klakante al la lerneja pordo, kun invito al Ihabod, ĉeesti festkunvenon, havotan samvespere ĉe S-ro Van Tassel; kaj deklaminte sian depeŝon kun la mieno de graveco kaj alteflugaj vortoj, kiujn negro emas paradi ĉe tielaj trivialaj komisioj, li forrapidis trans la rivereton kaj oni vidis lin, flugetantan tra la kavo, absorbitan per la urĝo de sia misio.

Jam regis bruo kaj skuo en la ĵus trankvila lernejo. La studentoj devis trakuri la lecionojn, ne haltante ĉe bagateloj; la viglaj transsaltis duonon senpene, dum la malfruemaj ricevis de tempo al tempo bastonan helpon per poste, por rapidigi ilin, aŭ levi super altan vorton. Librojn oni ĵetis, ne lokante ilin sur la bretojn; inkujon oni renversis, benkojn faligis, kaj la tuta lernantaro liberigis unu horon antaŭ la kutima tempo;

elŝirigante kvazaŭ legio da junaj diabletoj, kriegante, bruaĉante sur la herbokorto, el ĝojo pro sia frua emancipiĝo.

La brava Ihabod nun okupis almenaŭ unu ekstran duonhoron ĉe sia tualeteto, broŝante, polurante sian plej bonan—kaj la **solan**—kompleton da rustaj nigraj vestoj, kaj aranĝante sian hararon kun helpo de peco de rompita spegulo, kiu pendis en la lernoĉambro. Por prezenti sin antaŭ sia fraŭlino laŭ la vera modo de grandsinjoro, li pruntis ĉevalon de la farmisto, ĉe kiu li paslogis, kolerema maljuna Holandano, nomita Hans Van Ripper, kaj tiel brave rajdsidanta, ekiris kvazaŭ migranta kavaliro, kiu serĉas aventurojn. Sed konvenas, ke, en la vera spirito de l'romaneca historio, mi rakontu iom pri la aspekto kaj ekipaĝo de nia heroo kaj lia rajdbesto.

La besto, sur kiu li sidis, estis kaduka plugĉevalo, kiu postvivis ĉion krom sia maliceco. Li estis skeleta kaj krudhara, kun ŝafa nuko kaj kapo simila al martelo; liaj rustaj kol- kaj vosto-haroj implikiĝis kun lapoj; unu okulo perdis sian pupilon kaj palbrilis fantome, sed la dua havis en si la fajron de vera diablo. Tamen li nepre posedis forton kaj vivecon en sia flortempo, se oni povas juĝi laŭ lia nomo — Pulvo. Li estis, fakte, iam favorita ĉevalo de sia mastro, la kolerema Van Ripper, kiu estis furioza ĵokeo, kaj penetrigis, tre verŝajne, iom de sia propra spirito en la bruton; ĉar, kvankam altaĝa kaj kaduka laŭ la aspekto, sin kaŝis en li pli multe da diableco, ol en ĉiu juna ĉevalidino en la regiono.

Ihabod estis konforma figuro por tia rajdbesto. Li rajdis kun mallongaj piedingo, kiuj apenaŭ ne samniveligis la genuojn kun la selbutono; liaj akraj kubutoj elstaris kvazaŭ lokustaj; li portis la vipon vertikale en mano, kvazaŭ sceptron, kaj dum lia ĉevalo skupuŝadis, la movado de liaj brakoj ne malsimilis je svingado de paro da flugiloj. Lana ĉapeleto sidis sur la supro de lia nazo (ĉar tiel oni povis nomi lian preskaŭ nulan frunteton), kaj la baskoj de lia nigra surtuto postenflirtis preskaŭ ĝis la vosto de l'ĉevalo.

Estis, kiel mi jam diris, bela aŭtuna tago; la ĉielo estis serena kaj la na-

turo portis tiun riĉan kaj oran livre-on, kiun ni ĉiam asocias kun la ideo de abundo. Dum Iĥabod ŝoviĝis malrapide sian vojon, liaj okuloj, ĉiam videmaj por ĉiu simptomo de kuirebla bonaĵo, vagis kun plezuro super la trezoroj de l' gaja rikoltsezono. Sur ĉiu paŝo li rigardis vastan provizon da pomoj, jen pendantaj multegope sur la arboj, jen kolektitaj en korbojn kaj barelojn por la vendejo, jen amasigitaj en riĉajn arojn por la cidropremilo. Irante pluen, li vidis grandajn kampojn de maizo, kun oraj spikoj, kaŝrigardantaj el siaj foliaj kovriloj kaj promesantaj kukojn kaj kaŝpudingon; kaj la flavajn kukurbojn, kiuj kuŝis sub ili, montrante siajn belajn rondajn ventrojn al la suno kaj profetante plej klare pri luksegaj tortoj; kaj jen li pasis la bonodorajn poligon-kampojn, sugestantajn aromon de l' abelujo, kaj dum li rigardis ilin, ĉirkaŭprenis lian menson dolĉaj espero pri frandaj flanoj, bone buteritaj kaj garnitaj per mielo kaj melaso de la delikata kavetbela maneto de Katrina Van Tassel.

Tiel nutrante la spiriton per multaj agrablaj pensoj kaj sukeraj imagaĵoj, ĉirkaŭ la vespero Iĥabod alvenis al la kastelo de S-ro Van Tassel, kiun lokon li trovis svarmantan per la floro kaj kremo de la najbara loĝantaro. Maljunaj farmistoj—nedika ledvizaĝa raso, en hejme ŝpinitaj surtutoj kaj pantalonetoj, bluaj ŝtrumpoj kaj grandiozaj bukoj el stanplumbo. Iliaj viglaj velkaj edzinetaj, en malvastaj krispaj ĉapo, mallongaj roboj kun malaltaj zonumoj, hejme ŝpinitaj jupetoj, kun tondiloj kaj pinglujoj kaj gajaj poŝoj el kalikoto pendantaj ekstere. Plenkorpaj bubinoj, preskaŭ tiel antikvamodaj, kiel la patrinoj, esceptinte, ke tiu aŭ alia, kun pajla ĉapelo, bela rubando, aŭ, eble, blanka vesto, prezentis simptomojn de urba ennovigo. La filoj en mallongaj kvadratabaskaj surtutoj kun vicoj da latunaj butonegoj, kaj la haroj, torditaj ordinare en vostojn, laŭ la modo de tiu epoko.

Cetere Brom Bones estis la heroo de la sceno, veninte al la kolektiĝo sur sia favorata ĉevalo Diablo, besto, simile al li, plena de viveco kaj petolemo, kaj kiun neniuj krom li povis regi. Li estis ja fama pro tio, ke li preferis sovaĝajn bestojn, inklinajn al

ĉiuspecaj artifiko, kiuj tenis la rajdanton en konstanta risko, rompi al si la kolon; ĉar li opiniis, ke milda bone dresita ĉevalo estas neinda je kuraĝulo.

(Daŭrigota)

Ĉe Londona festeno, kiun ĉeestis Usona fraŭlino, oni rakontis jenan anekdoton pri famekonata angla aŭtoro: Dum la nokto li kutimis vekti la edzinon, kriante: "Marta, Marta, leviĝu, mi ĵus ekpensis bonan vorton!" Ĉiam sen murmuro la kompatinda edzino leviĝis, ekbruligis kandelon, serĉis paperon kaj plumon, enskribis la vorton kaj revenis en liton. Apenaŭ ŝi ekdormetis, kiam denove la edzo faris saman peton. Ĉiu, kiu aŭdis la rakonton, esceptinte la Usonaninon, multe ridis. Angla fraŭlo, kiu sidis apude, demandis kial ŝi ne ridas? Ŝi respondis: "Ĉu vi scias, kion mi dirus, se mi estus edzino de tia viro kaj li farus similan peton al mi?" Kompreneble la anglo tute ne povis diveni sian penson; tial ŝi klargis: "Je lia krio, 'Leviĝu, mi ĵus ekpensis bonan vorton!' mi tuj respondus, 'Leviĝu vi mem, mi ĵus ekpensis malbonan vorton!'"



La Redaktoro serĉas Linotipiston

DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anonco: 20 sd.; kvarfoje 50 sd. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.

F-ino Maria Martin, 1102 W. Church St., Urbana, Illinois, Usono. Nur kun gefremduloj. 4
S-ro Jose Alvarez Garcia, Ave. 18 de Julio No. 1020, Montevideo, Uruguay. 3
M. Amiel, Box 1029, El Paso, Texas.
S-ro William J. Leahy, Box 55, Stonington, Conn., Usono. 3
Giles Edgar Kindley, Davidson, N. C., Usono. 3
S-ro William J. Leahy, Box 55, Stonington, Conn., Usono.
S-ro Petro Babić, G.P.O., Auckland, New Zealand (Il. PK).
S-ro Jakov Vodanović, G.P.O., Auckland, New Zealand, (Il. PK) 8
S-ro Fernand Lepercq, Soldato, 13a reg. Inf., Audeloncourt par Clesmont, Haute Marne, France. Ĉiam respondos.
S-ro N. Rudnický, poŝtoficeisto, Taŝkent Ic, (Russian Turkestan, Central Asia), pri vivo kaj laborkondiĉoj en Ameriko Ĉar leteroj ne estas riceveblaj, skribu per PK.
S-ro N. T. Goddard, 113 N. Univ., Vermillion, So. Dakota, Usono. 2
F-ino Leona M. White, Beloit, Kans., Usono. Nur kun fremduloj. 2
S-ro W. O. Wanzer, Beloit, Kans., Usono. Nur kun fremduloj. 2
S-ro Henriko Chantry, Tendaro 1, Barako 30, Zeist, Holland.
S-ro Armand B. Coigne, 243 Bedford Park Boulevard, New York, U. S. A. Deziras tuj

korespondi letere kun personoj interesataj pri psika enketado kaj eksterordinara psikologio. Precipe kun kuracistoj kaj psikologiistoj, ankaŭ kun neadeptuloj. 1
S-ro Albert Burkett, 113 N. Univ., Vermillion, So. Dakota, Usono. 2
S-ro Wm. A. Knox, 113 N. Univ., Vermillion, So. Dakota, Usono. 2
S-ro M. W. Pangburn, 113 N. Univ., Vermillion, So. Dakota, Usono. 2
S-ro Benecchio Alessandro, Correspondante Mondiale, Cassella Postale 19636, Lugano, Switzerland. 1

MONOGRAM-PRESILO

Oportuna, kompakta, distingiga, neta, ĉiamdaŭra. Ideala donaco por ia okazo.. Unu aŭ du ĉefliteroj—25 cendoj.
Leahy's, Bx. 264, Alexandria, Va.

MIGRANTAJ KARTOJ !!!
6 FOR 10 cts. 25 FOR 25 cts.

E. H. BECKER
332 Third Ave., Dayton, Ky.

Kiel Mi Scias ke la Mortintoj Revenas
by W. T. Stead, late of London
one of the leading Esperantists of England.
Esperanto translation soon to be issued.
Prices not yet set, but information will be forwarded on receipt of inquiry, when published. Boston Esperanto Society, 402 Pierce Bldg., Boston, Mass.

SHEET MUSIC

IN
ENGLISH & ESPERANTO
WITH KEY TO ESPERANTO

Evening and Morning
Torn From Each Other
Save the Boys
Peace Between Nations
The Home Place
The Santa Claus Ship
A Cruel War
America's Prayer for Peace
Too Precious To Lose
Lay Down Your Arms, Ye Nations
No Flowers For Me When I'm Gone
Save United States From Rum
United States of Europe
If 'Twas Your Boy or Mine

Two Songs in One Each 15c postpaid

A. E. BEATTY, Cardington, O.

YOU NEED IT

IN

Correspondence & Conversation

THE HARRIS'

ENGLISH ESPERANTO DICTIONARY

25 CENTS POSTPAID

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.

WEST NEWTON, MASS.

LA EMERSON-A "Synchrona"

Sep apartaj kaj malsamaj metodoj por ludado estas uzeblaj de la posedanto de Emerson-a "Synchrona."

Ĉu ludata elektre (reproduktante aŭtomate la ludadon de famkonataj muzikistoj) aŭ per iu el la ses aliaj metodoj, la Emerson-a "Synchrona" povas plenumi unike la deziron de ĉiu familiano por muziko laŭ ties gusto.

La "AccompanO" eksklusiva ĉe le Emerson-a "Synchrona"--estas aldonaĵo per kiu oni povas perfekte reguligi kaj kontroli la ludadon je distanco.

Vendistoj en ĉefaj urboj kaj urbetoj

Petu Katalogon

EMERSON PIANO COMPANY

Boston, Mass.

(Fondita 1849)
